

Theodor Storm,  
Die Stadt

Am grauen Strand, am grauen  
Meer  
Und seitab liegt die Stadt;  
Der Nebel drückt die Dächer  
schwer  
Und durch die Stille braust das  
Meer  
Eintönig um die Stadt.

Es rauscht kein Wald, es schlägt im  
Mai  
Kein Vogel ohn Unterlaß;  
Die Wandergans mit hartem Schrei  
Nur fliegt in Herbstesnacht vorbei,  
Am Strande weht das Gras.

Doch hängt mein ganzes Herz and  
dir,  
Du graue Stadt am Meer;  
Der Jugend Zauber für und für  
Ruht lächelnd doch auf dir, auf dir,  
Du graue Stadt am Meer.

...

Theodor Storm,  
La urbo

*tradukita de Manfredo Ratisla-  
vo*

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza  
mar'  
Situas la urbeto;  
Nebulas sur la tegmentar',  
La monotona bru de l' mar'  
Aŭdiĝas tra l' kvieto.

Arbar' ne estas tie ĉi,  
Ne kantas bird' sen ĉeso;  
Anseroj nur, kun dura kri',  
Forflugas alte preter ĝi,  
Ĉe l' strando flirtas greso.

Sed pendas mia kor' de vi,  
Vi griza urb' ĉe-mara;  
De la juneco sorĉe-graci'  
Ridante kuŝas super vi,  
Vi griza urbo kara.

...

Theodor Storm,  
La urbo

*tradukita de Richard Schulz*

Ĉe griza strand', ĉe griza  
mar',  
Jen kuŝas la urbet'.  
Nebulo ondas trans digar',  
Kaj muĝas tra l' silent' la  
mar'  
Proksime de ' urbet'.

Susuras ne arbar'. Sen ĉes'  
Ne kantas maje birda par'.  
En nokt' autuna preter  
gres'  
Kaj griza strand' kun kria-  
gres'  
Flugmigras anserar'.

Sed batas mia kor' por ci,  
Ci griza urb' ĉe l' mar'.  
La ĉarm' de la junec' por  
mi  
Ridete brilas plu sur ci,  
Ci griza urb' ĉe l' mar'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04).*

*Arg-173-345 (2004-02-22 12:35:36)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03.*

*Arg-173-346  
12:54:29)*

*(2004-02-22*

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-173-347  
15:12:58)*

*(2013-02-26*

*La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro "La muzino" de Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn', Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo "Esperanto aktuell". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*